

# Eŭropa Bulteno

aprilo 2006, № 4 (46)

*De la redakcio...*

**Karaj gelegantoj,**




Ni savu ITV, la unuan retan televidon en Esperanto!

<http://www.eo.pledgebank.com/ITVmonhelpi>

Subskribu mem, kaj subskribigu tiun mondonaco-promeson al viaj geamikoj kaj konatoj.

Certe tio ne sufiĉas, bezonatas 1000 EUR monate por sekurigi estadon de ITV.

Ankaŭ subskribu la peticion, indikante kiom vi pretas doni ĉe:



<http://www.petitionspot.com/petitions/ITV>

Antaŭdanke,  
Aleks Kadar

Pri detaloj tralegu la artikolon "Realo kaj Fantazio - Dua Parto" ĉe [www.gxangalo.com](http://www.gxangalo.com)

Mi invitas vin partopreni ankaŭ en skribado de artikoloj por la Bulteno. Ĉiuj novaĵoj estas bonvenaj, dividu ilin kun ni!

**Agrablan legadon!**

**Vesna Obradović**

## NOVA LOGOTIPO DE EEU KAJ DOMAJNO [www.europo.eu](http://www.europo.eu)

Dum aprilo estis kreita nova logotipo de EEU - kiun oni uzos por la organizo en diversaj manieroj - ĝi estis uzita por la kaplinioj de EEU-leteroj (sendataj kromalie ankaŭ al EU-parlamentanoj), same ĝi estos uzata en la nova paĝaro de EEU, kaj en nova stampo.

Same la elkreo de nova propra paĝaro de EEU okazas - la paĝaro estos lanĉita ĝis fino de majo (post ĝia lanĉo estos farita alvoko por traduko de la paĝaro nacilingven).

Aprile oni sukcesis akiri/aĉeti eu-domajnon: [www.europo.eu](http://www.europo.eu) - kiu nun iĝos la hejmpaĝo de EEU. (Ĉar ne estis certe, ke oni sukcesos kun atingo de tiu domajno, oni jam antaŭe ekposedis ankaŭ domajnon [www.europo.net](http://www.europo.net).)



Nova logotipo de EEU

Tiel/tial paĝaro de EEU havos du nomojn: [www.europo.eu](http://www.europo.eu) kaj/aŭ [www.europo.net](http://www.europo.net) - minimume ĝis kiam oni trovos alian bezonon por la nomo [www.europo.net](http://www.europo.net).)

Aprile oni same komencis kunlaboron kun la *Nitobe centro por lingva demokratio* (<http://eo.nitobe.info/> - centro, kiu "*levas demandojn pri internacia komunikado kaj egaleca lingvopolitiko*" kaj kiu "*kocentriĝas je informoj kaj demandoj ĉirkaŭ la kuniĝanta Eŭropo*"). Oni uzis ties traduk-sistemon kaj tradukist-reton por tradukigi la koncizan konkludon de la Grin-raporto, kiu estas sendota baldaŭ al la EU-parlamentanoj, subskribita de Maĝorzata Handzlik, Renato Corsetti kaj Seán Ó Riain.

Decidite far estraro estis ankaŭ ioma pligrandigo de la jahugrupo por ĝenerala asembleo de EEU: <http://fr.groups.yahoo.com/group/ghenerala-sembleo-de-eeu/> ("Listo por la reprezentantoj de la landaj asocioj en la landoj de Europa Unio en Europa Esperanto-Unio kaj por la estraro de EEU kaj ties komisiitoj.") - tiel, ke rajtos aliĝi ne nur reprezentantoj de unuopaj landaj asocioj, sed bonvenas ankaŭ aktivuloj, pretaj je diskuto kaj aktiva kunlaboro en eŭropa medio. Tial se iu volas aliĝi, bv. sendi malplenan mesaĝon al: [ghenerala-sembleo-de-eeu-abonnement@yahogroupes.fr](mailto:ghenerala-sembleo-de-eeu-abonnement@yahogroupes.fr) - post ĝia forsendo vi ricevos mesaĝon - kiun sufiĉas malfermi kaj resendi = "replay". Kaze ke bezonatos helpo, bv. skribi al: [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net).

Peter Baláž

## **BRUSELA KONFERENCO PRI MALPLIMULTAJ LINGVOJ EN EDUKADSISTEMOJ, BRUSELO, 27-28-a DE APRILO 2006**

Partoprenis la prezidanto de EEU, Seán Ó Riain, kun Flory Witdoeckt, Walter Van den Kieboom, Jozef Reinvart, Michael Cwik kaj David Ferguson en ĉi-tiu interesa konferenco, kiun organizis la Eŭropa Komisiono. Ĉeestis 230 personoj kiuj reprezentis 50 milionojn da homoj en EU kiuj parolas neoficialajn autoĥtonajn lingvojn, kaj parolis konataj lingvistoj kiel Francois Grin, Colin Baker; John Harris, Pádraig Ó Riagáin, Christine Hélot; politikistoj kiel la kimra ministrino Jane Davidson; oficistoj de la Komisiono kiel Jacques Delmoly, la ĉefo de la sekcio pri multlingvismo, kaj oficistoj de Konsilio de Eŭropo kiel Philip Blair, kaj multaj lingvaj aktivuloj, kiel la fondinto de la Europa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj (EBLUL), Dónall Ó Riagáin kaj la nuna prezidanto de EBLUL, D-ino Neasa Ní Chinnéide. Malfermis la konferencon Komisionano Jan Figel.

Esperantistoj aktive partoprenis en 10 laborgrupoj, kaj konstante sed ankaŭ diplomate proponis plian esploradon pri la lernfaciligaj ecoj de Esperanto. Bonŝance Profesoro Colin Baker menciis en sia parolado ke iu ajn dua lingvo, bone lernita, havas plifaciligajn ecojn por la lernado de postaj lingvoj. Seán Ó Riain bazis sian intervenon sur la eldiro de profesoro Baker, kaj invitis la Komisionon subteni esploradon en tiu senco. La prezidanto de la sesio, Francois Grin, diplomate subtenis la ideon, sen menciigi Esperanton kaj je nia granda surprizo, S-ro Delmoly ne atakis la ideon, ne ripetis ke Esperanto estas lingvo sen kulturo, sed tute pozitive diris ke la ideo estas interesa kaj "meritas ke ni studu ĝin."

Kiam Seán Ó Riain poste private dankis Delmoly pro la pozitiva reago, li diris ke li legis la kontribuon de Seán en la pariza konferenco pri multlingvismo en novembro, kaj trovis "ke ĝi enhavas tre interesajn ideojn". Li plue diris ke "la tuta afero estas tre delikata, ĉar multaj eĉ timas diskuti tiujn temojn pro la ekstrema politika sensiveco de la temo".

Hazarde samtage venis informo ke la numero 1/2006 de Langues Modernes pri Le Plurilinguisme, kiu ĵus aperis, enhavas mian artikolon Les Langues et l'identité européenne, bazita sur la novembra kontribuo en parizo. Hieraŭ mi plusendis tiun informon, kun la franclingva resumo de la libro de Profesoro Phillipson, "Ĉu Nur-angla Eŭropo?" al ĉiuj partoprenantoj de la konferenco. Ni vidos ĉu estos reagoj.

Seán Ó Riain

## PASKA DIMANĈO EN VATIKANO

Dum Pasko la Papo remetis Esperanton inter la 62 lingvojn de siaj paskaj bondeziroj "al la urbo kaj al la mondo", post URBI ET ORBI. Li diris "Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta". Pli ol 1 miliono da homoj ĉeestis, kaj pli ol 1 miliardo aŭdis la uzon de Esperanto fare de ŝtatestro televide. La Esperantistoj tenadis grandegan afiŝon "ESPERANTO" kiu estis ĉie videbla: la franca televido, kiun mi rigardis, montris la afiŝon dufoje kaj denove kiam la Papo parolis en Esperanto. Tiel firmiĝas tradicio de uzo de Esperanto en URBI ET ORBI kiu komenciĝis paske 1994, kaj kiu daŭras ekde tiam paske kaj kristnaske ĉiujare kaj nun sub la dua Papo.



Tio estas grandega reklamo por Esperanto, atingo por la Esperanto-Movado kaj tutspeciale por IKUE, kiu laboris malantaŭ la kulisoj ekde la ne-uzo de Esperanto fare de la Papo kristnaske 2005. Multaj homoj kunlaboris por atingi tion, kaj ni volas elkore danki ĉiujn kiuj helpis. Kiel Prezidanto de EEU mi faris kelkajn diplomatiajn elpaŝojn: mi kuraĝigis plurajn samideanojn kontakti la papajn aŭtoritatojn, kaj mem skribis franclingvan leteron al la Papa Nuncio ĉe Eŭropa Unio en Bruselo, Monseigneur André Dupuy, substrekante la kialojn por ke la Papo daŭrigu la tradicion de la publika uzo de Esperanto post URBI ET ORBI ĉiupaske kaj ĉiukristnaske.

Seán Ó Riain

## SUKCESA KUNLABORO DE EŬROPAJ ESPERANTISTOJ PRI TUTEŬROPA PROJEKTO

Instituto por edukado de plenkreskuloj en Maribor (AZM-LU) iniciatis ellabori interesan projekton baze de konkurso de Eŭropa Komisiono kiel evoluigi efikan debaton inter eŭropaj civitanoj kaj la Eŭropa Komisiono. Limdato transdoni la kompletan dokumentaron estis la 24<sup>a</sup> de aprilo. La projekton ellaboris Zlatko Tiŝljar kaj oni sukcesis ligi al la projekto eĉ 5 esperantistajn organizojn kiel partnerojn: EEU, Unuiĝon de Francaj Esperantistoj, Humanisman Eŭropan Asocion en Hungario, Danan Esperanto-Asocion kaj Slovakon Esperanto-Junularon. La kompleta kosto de la projekto antaŭvidita estas 300.000 eŭroj kaj la realigo devus okazi dum periodo de 15 monatoj inter junio 2006 kaj septembro 2007. Se Eŭropa Komisiono akceptos financi la projekton, ni informos la legantojn de Eŭropa Bulteno pli detale en sekvaj numeroj.

Zlatko Tiŝljar

## EUROSCOLA-ARANĜO EN EŬROPA PARLAMENTO EN STRASBURGO



La 27-an de aprilo 2006 vizitis Euroscola-aranĝon en Eŭropa Parlamento en Strasburgo partoprenantoj de Eŭropa Amikeca Seminario okazinta tri tagojn antaŭe (24-26-a de aprilo) en la sama urbo kun 16 partoprenintoj el Finnlando, Kroatio, Slovenio kaj Portugalio. Alparolante la 400 gejunulojn el 16 landoj reprezentanto de la finna lernejo menciis Esperanton kaj en la posttagmeza laboro slovena juna esperantistino Maja Ŝmitran sukcesis enmetigi en resolucio de la Komisiono por rolo de EU en la mondo 'ke estas propono ke identeca EU-lingvo estu Esperanto'. Simila mencio estis la unuan fojon akceptita dum Euroscola-tago en 2002. La Europa Amikeca Seminario, kiun jam 4 jarojn sinsekve en Strasburgo organizas Carola Anstskog el Finnlando kaj kies parto estas partopreno en Euroscola ĉi-foje plenumis ĉiujn siajn celojn. Gejunuloj lernantaj en siaj mezlernejoj Esperanton dum la tri tagoj multe amikiĝadis kaj lernis E-on kaj la kvaran partoprenis kvalite en aranĝo organizata de Eŭropa Parlamento. Dank al E-aranĝo kaj la finn-kroata kunlaboro, la unuan fojon oficiale partoprenis kroata grupeto en Euroscola kaj nome de ĝi la partoprenintojn salutis Tina Tišljär. Kvankam Euroscola estas nur formo de politika lernejo en kiu gejunuloj de eŭropaj mezaj lernejoj lernas pri funkciado de EU, tamen la fakto ke jam la duan fojon en resolucioj aperas Esperanto povus pensigi politikistojn ke inter eŭropaj gejunuloj estas ĉiam pli da tiuj kiuj opinias ke Esperanto povus esti komunikidenteca lingvo de EU.

Zlatko Tišljär

## LIBROTAGO EN HISPANIO

### Publika Laŭtlegado de *Don Quijote* en Madrido

La 23-an de aprilo, datreveno de la morto de Cervantes kaj de Ŝekspiro, oni solenas en Hispanio la Tagon de la Libro. Ekzistas kutimo publike laŭtlegi la tutan tekston de la romano *Don Quijote* en kulturasocio Círculo de Bellas Artes, en Madrido. La legado daŭras ĉirkaŭ 60 horojn, tage kaj nokte, fare de pli ol mil volontuloj kiuj sinsekve legas po kelkajn liniojn el la libro. La legado estas aŭdebla per radio kaj videbla rekte per Interreto.

De kelkaj jaroj, esperantistoj partoprenas en la legado kaj legas sian parton en Esperanto. La legado komenciĝis ĉi-jare la 21an de Aprilo matene kaj daŭris ĝis la 23-a vespere, kaj la esperantistaj legantoj, kiuj partoprenis la 22-an matene, estis Alejandro Pareja kaj Manolo Parra. Kiel kutime, la legado en Esperanto vekis sufiĉe da intereso en la publiko.



### Librobudo en Barcelono



La saman tagon, dimanĉon la 23-an de aprilo, Kataluna Esperanto-Asocio aranĝis librobudon en la Rambla de Barcelono. La budo staris de la 8:30 ĝis la 21:00a kun rekorde sukcesa bilanco, ne nur pro la kvanto da disvendoj sed ankaŭ pro la granda interesiĝo rilate al Esperanto de la preterpasantoj. Mi dirus ke la sukceson kaŭzis la fakto ke la ĉi-jara librotago okazis en dimanĉo. Tio surstratigis multajn homojn kaj matene kaj posttagmeze.

Deĵoris kaj helpis en la budo Àngels, Carme Bonet, Farri, Joelo, Jomo, Josep Franquesa, Kiara, Lluís Batlle, Miquel Gómez i Besòs, Onjo, Roger, Sjoerd kaj Xana (mi esperas forgesi neniun). La grava nombro de eksterlandanoj paroligis nin ĉiujn en Esperanto kaj grandega kvanto da preterpasantoj alproksimiĝis aŭskulti nin scivoleme. La scivolemo kaj la konstato de nia flua parolado en esperanto interesigis multajn homojn. Eĉ eksterlandanoj estis helpitaj sialingve de "niaj" eksterlandanoj. Kelkaj vizitintoj anoncis sian ĉeeston en la renkontiĝo de Canet kaj aliaj sian intereson partopreni niajn kursojn. Multajn ĉarmajn anekdotojn oni povas rakonti pri la iro de la tago.

Alejandro Pareja kaj Farri Macip

## **Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita:** la 30-an de aprilo 2006.

**Redaktorino:** Vesna Obradović.

**En la numero kunlaboris:** Seán Ó Riain , Zlatko Tisxljar, Aleks Kadar, Alejandro Pareja, Farri Macip kaj Vesna Obradović.

**Leterojn kaj komentojn sendu al la seretario de EEU:** [zlatko.tisljar@azm-lu.si](mailto:zlatko.tisljar@azm-lu.si)

**Kontaktoj:** [komunikadcentro@esperanto.org](mailto:komunikadcentro@esperanto.org) kaj [vesna.obradovic@email.si](mailto:vesna.obradovic@email.si)

**Retpaĝo:** <http://www.lingvo.org>